During my first few years of business life, the "belonging" habit grew, being, so to speak, rather forced upon me. A Business club entered my name for membership, and I joined long enough to pay two or three months' dues at 50 cents per—when, deciding that it was more of a Bunch of Business Busy-Bodies, than anything else, I resigned. Meanwhile, the Cause of Woman, had caught and held me,—in fact, holds me yet. I therefore must needs belong to our local suffrage organization, donating besides my nominal dues, much time and as many of my few pennies as I was able, to "the cause."

Thus it continued, until a short while ago I met, and promptly fell captive to, the charms, ideals and possibilities of Esperanto, the International Language. A deep interest and serious enthusiasm for the subject carried me thru the intricacies of "getting started" and I shortly found myself able to read and write fluently in the auxiliary tongue. The Esperanto circle in which I first became interested, had been opened in one of my numerous clubs, but upon securing reading material, books, etc., from the Esperanto headquarters, I learned that a national organization for the propagation and dissemination of the International Language exists,—The Esperanto Association of North America,—and I was invited to assist in the organized propaganda work by becoming a member, at the small sum of 50 cents per annum.

In the press of other matters, the invitation was forgotten for a short time until an incident served to bring it to my attention again. While enthusiastically discoursing upon the possibilities and achievements, past, present and future of the International Language, before a few members of our wide-awake Civic Club, one of them, a College Professor, remarked:

"Well, just how much gain is this Esperanto making anyway? What represents the idea in this country,—just a few of you wild-eyed enthusiasts? Or are there steps being taken in an organized way, to push the language?"

"Why, er-er-," I hesitated, when my sub-conscious mental apparatus asserted itself, "Why, there is a national body, The Esperanto Association of North America, made up of individual members and affiliated groups, work-

ing as an organization to further the Esperanto movement."

I felt rather weak, as I usually make an endeavor to "practice what I preach," so cutting the discussion as short as possible, mentally resolving its continuance at a more favorable opportunity, hustled to the nearest post office, where I secured and dispatched a money order in the sum of 50 cents to the Esperanto Central Office to cover my membership fee, for the current year.

Following that 50 cents as it arrives at the office any ordinary working day of any ordinary week, what do we find being done?

Well, that morning,—an average morning,—the first mail contained in addition to my membership, 14 other letters, 5 postcards, 2 marked newspapers and three foreign Esperanto journals.

Letter No. 1 was an order for four different books,—remittance entered, order placed on order sheet for further attention.

L. 2—Manuscript, "originale verki-ta," (poetry) from an aspiring Esperantist of two weeks, who never wrote a paragraph before in his (or her) life, and wouldn't know a poetry meter from a gas meter; letter accompanying, "Please publish this in your next number." "Diplomatic note" is written to sender, several of the more prominent errors pointed out, and a cheerful request to "try again," takes care of L. 2.

L. 3—Renewal to **Amerika Esperantisto** and membership fee,—former entered on order slip, latter entered in membership files, and membership card sent sender, with personal letter.

L. 4, 5, 6—Inquiries, each asking special information requiring personal answers, general information sent each with copy of **Amerika Esperantisto**.

L. 7—"....Have not received my magazine for two months, what's the matter with your mailing system? By the way, I moved during the Christmas holidays to the South." Another diplomatic note, address changed, and duplicate copies of the missing magazines sent.

L. 8>Returns from —Division, and a nice, encouraging letter from the district secretary. The office visibly brightens, an answer is written, and memberships filed in double-quick time.

L. 9—with clipping enclosed,—an editorial which informs us that Esperanto died in 1896, and after many unsuccessful attempts, the "new language", "Universilly", has been evolved and is here to stay! Clipping is acknowledged with many thanks to the thoughtful sender, and then a long epistle, bristling with Facts, is sent to ye too progressive editor, while other Facts, in printed form, are sent him under separate cover.

L. 10—Order for text-books for a new class. Order entered and note of encouragement and good wishes dispatched to the successful organizer.

L. 11—Inquiry from one of our members as to grammatical terminations of certain words. Acknowledged, and request sent to editor of Beginners' Department for answering in the official organ.

L. 12—Registration fee for "Supera" examination. Name entered and papers copied and sent

L. 13—Renewal to **Amerika Esperantisto** and subscription for the Sat-evepost. First entered on order slip, second dispatched with check to destination.

L. 14—Order for books, entered on order slip.

L. 15—My membership fee, which was entered, card filed, membership card made out, with the "cute, little E.A.N.A. button" attached, and a letter written, thanking me, and desiring my further active cooperation.

Postcards 1 and 3 were changes of address which were made on mailing list and in the automatic card file; 2, 4 and 5 were inquiries for information which was sent.

By the time the second mail was arriving, —not quite so heavy as the morning one,—there only remained the marked newspapers to be acknowledged; the book orders to be filled; packages wrapped, addressed, and mailed; renewals attended to, and each acknowledged; magazines sent to the new subscribers; the three foreign magazines looked thru, and such news as could be used, extracted for the next issue of **Amerika Esperantisto**.

As the day passed, almost too quickly, much the same routine was followed in connection with the second and third mails,—after this last, all orders for the day being entered in the card ledger file; books checked on the book record; an order for a certain book sent an American publisher; a number

of "form" letters sent to some backward subscribers and members; a number of other different "form" letters sent some "prospects" who it was hoped could be secured for the cause; some material of propaganda value, placed in shape for the next issue of the magazine; a manuscript copied for that same number; all correspondence for the day filed; letters stamped for mailing, and

"GOOD Night!" said I, as I fled at twilight, exhausted mentally and physically.

Resting that evening, I thought it over.

"Just what part," I mused, "Just what infinitesimal part of today's work at that Central Office, does my 50 cents per year cover?"

E. A. N. A. NOTES

The Board of Directors of the Kalifornia Esperantista Rondaro has submitted the name of Mr. Wm. H. Chase of San Francisco, to the Central Office, to be referred to the Councilor body for approval as the new councilor for the Western Division, succeeding Proi. Langille, resigned. Mr. Chase is one of the pioneer Western Esperantists, was a member of the Board of Directors for the 1915 Congresses, and has been instructor for the past year in the San Francisco Rondo. The choice of the Rondo will undoubtedly receive the unanimous approval of the Councilors.

The Councilor of the Canadian Division, Mr. Chester H. Crossman, has appointed a Propaganda Committee consisting of nine members, one for each Province, and one, Mr. Paul B. Gamble, "at the front." Mr. Gamble has recently enlisted in the 65th Battalion and intends continuing his end of the propaganda "somewhere in France".

Mr. Herbert M. Scott, on the staff of **Amerika Esperantisto** has finished a complete Concordance of the Writings and Speeches of Zamenhof, and likewise practically completed a Concordance of all works of Kabe, similar in scope to the afore-mentioned. He is now starting on the other well-known Esperanto writers, Grabowsky, Sam. Meyer, Cart, etc. The material completed is truly the successful culmination of long and careful study, and it is hoped that it may be possible to bring the work before the Esperantistaro by publication in book form.

The Chairman of the Propaganda Committee, Mr. D. E. Parrish and Mrs. Parrish have removed to Toron-

to, Canada, amid the wails and gnashings of teeth heard from California. The loss of both is felt deeply by the newly-established Kalifornia Rondaro, but let's watch Mr. Parrish wake up Toronto, in his well-known extremely quiet and effective way!

The number of "recruits" for the examinations grows larger rapidly and as we race to press has increased more than 75% in ten days. Keep it up—voluntarily—it may yet be unnecessary to resort to conscription.

Our Recent Successful Candidates Passed "Elementa"—

- *Antono Bohm, New Hampshire.
- *Clement Warren Barker, California.
- *Charles H. Matchett, Massachusetts.
- *Alfred G. Sawyer, New Hampshire.

Passed "Supera"—

- Rev. John H. Fazel, Kansas.
- *Mrs. Flora M. Wyman, Massachusetts

Mrs. Olivia E. McHugh, Utah.

(*) indicates honorable mention.

Special & Sustaining Members

Any person by the payment of \$10. for the maintenance of the Central Office of the Association, receives a certificate of Sustaining Membership, and is published among our Sustaining Members.

(cont'd)

Mr. J. A. Whitcomb, New York.

Mr. Jos. Silbernik, New York.

Any person by the payment of \$2. towards the special propaganda work of the Central Office receives a card of Special Membership, and is published among our Special Members.

(cont'd)

Howard B. Frost, California.

LA FANTOMO EBRIA

DE ARLO BATES, LITT. D.

Tradukis Herbert Harris, laŭ Permeso

Ricevis honoran mención en la Literatura Konkurso de la 11a Kongreso

(La Unua Parto de "La Fantomo Ebria" aperis en la Feb.-Mar. Amerika Esperantisto).

IV

La sekvintan tagon Ireno sin trovis kun la leŭtenanto en remboato sur la rivero. Unue ŝi rifuzis lian inviton; sed poste ŝi sentis sin tiel fiera pro la firmeco de sia karaktero, per kiu ŝi kontraŭstaris la tenton, ke ŝi tuj sekvis la rifuzon per konsento!

La tago estis ĉarme varmeta kaj bela. Diafana nebulo iom ŝirmis ilin de la sunradioj, kaj suda venteto ie trovis spicoriĉan kaj refrešigan odoron, kiun ĝi tre afable disvastigis super la akvo. La rivero fluadis trankvile, kaj iu kapabla por sentimentaleco malfacile kontraŭstarus la influon de la tago.

La leŭtenanto amis Irenon tiel fervore, kiel povas viro, kiu estas kaj soldato kaj belulo; eĉ pli fervore ol oni atendas de persono havanta tiajn kialojn de memkontenteco. La fakteto ke ŝi posedis multe da mono, kaj ke li mem havis neniom, donis al lia amo de lia vidpunkto, tian malesperon, kia multe plifortigis ĝian fervoron. Persiaj grandaj brunaj okuloj li rigardesis sian kunulinon sidantan kontraŭ li; sed, dank' al la densaj brovoj kaj pezaj lipharoj, li ne aspektis tiel stulta, kiel alie oni eble opinias.

Fraŭlino Gaspik estis tute konscia pri la allogeco de la okazo kaj de la kunesto de la juna oficiro, sed ŝi decidigis antaŭ ĉio, esti diskreta.

"Arturo," ŝi diris, por teni la interparoladon en sendangera vojo, kaj ankaŭ por ricevi la sciigon, kiun ŝi deziris eltrovi, "ĉu oni jam serĉis la McHughan diamantaron?"

"Serĉis!" li ripetis. "Oni provis ĉion, krom la detruo de la domo. Ĉiu membro de la familio, de la tempo kiam la juveloj estis perditaj, partoprenis en la serĉado."

"Mi ne komprenas—" Ireno komencis, sed li malgentile interrompis ŝin dirante:

"Neniu komprenas. Kredeble la solvo de la enigmo estas tiel simpla, ke neniu ĝin divenos. Iatempe oni trovos

ĝin tute neatendite. Tamen, ni ja priparolu ion alian. Mi ĉiam kolerigas, kiam oni nomas la McHughan diamantaron."

Li elpelis sian malpaciencon per subite fortega remado, pro kiu la boato trakuris la akvon kun fulma rapideco; poste sin skuante, kvazaŭe por forigi la malagrablajn pensojn, li denove permesis la boaton naĝi kun la riverfluo. Ireno rigardis lin per sopiremaj okuloj. Tiel volonte ŝi donacus al li sian tutan posedajon, se li ĝin nur ricevas.

"Vi sciigis min," ŝi fine diris, kun ioma ŝajno de memkonscieco, "ke vi volas aldiri ion al mi."

La juna leŭtenanto ruĝigis, kaj rigardis malproksimen, inter la trunkojn de la malnova jarboj sur la bordo de la rivero. "Mi volas," li respondis. "Gi estas impertinentajo, ĉar mi ne havas la rajton ĝin diri al vi."

"Vi povas diri ĉion, kion vi volas diri," respondis Ireno, kvankam, pro lia tono, ia nedifinebla antaŭtimo ekposedis ŝian animon. "Ni certe reciproke konas nin sufice longan tempon por tio."

"Nul!" la alia eldiris kun tia subiteco, ke lia penego estis klare videbla. "Vi devus edziniĝi, Ireno!"

Ireno preskaŭ ekploris, sed kun vere virina firmeco ŝi anstataŭe sukcesis ri-di.

"Cu mi do fariĝas tiel ege maljuna kaj velkema, Arturo?"

Lia rigardo, plena de riproča neado, estis sufice elokventa por ne bezoni īan ceteran vorton. "Kompreneble ne," li diris, "sed vi devus ne atendi la tempon kiam—"

"Kiam mi tia fariĝos," ŝi finis lian frazon, kiam li ŝanceligis. "Kial do, Arturo, vi ne petas ke mi edziniĝu kun vi mem?"

En lian vizaĝon la sango fluegis, kaj tuj forfluis, lasante lin tiel pala, kiel tiom sunbrunigita viro povas esti. Li kunpremegis la dentojn, por haltigi parolon kiu baraktis por eligi, kaj Ireno kaše admiris la fortegan manpremon sur la remoj. Si povis esti fiera pri lia sinregado, ĉar la forteco de liaj sentoj ŝin kontentigis; kaj ŝi estis preskaŭ tiom kortuŝata per la amema,

peteganta rigardo de liaj brunaj okuloj, kiom ŝi estus per kareso.

"Pro tio," li diris, "ke oni ankoraŭ neniam nomis la McHugh'ojn serĉantoj al riĉajoj, kaj mi ne volas esti tiu, kiu venigos tian riproĉon al la familio."

"Kiel abomene egoisma maniero, kun kiu rigardi ĝin!" ŝi kriis.

"Kredeble ĝi tiel ŝajnas al virino."

Siavice la sango fluegis en la vizaĝo de Ireno, kaj dum kelke da minutoj aŭdiĝis nenia sono, krom tiu de la akvo mole plaŭdanta kontraŭ la boatojn. Tiam refoje parolis Fraŭlino Gaspi:

"Estas eble," ŝi diris per tono tiel malvarmega, ke la kompatinda leŭtentanto ne kuraĝis respondi, "ke la fakto, ke vi estas viro, malpermesas al vi kompreni, kiel sentas virino, kiu sin jetis al viro, kiel mi faris, kaj estas rifuzita. Revenigu min al la bordo."

Kaj li trovis nenian vorton per kiu respondi.

V

Esti proponinta sin al viro, kaj esti rifuzita, tute ne estas agrabla sperto por ia virino; kaj, kvankam Ireno antaŭe sciis ke la motivo, kiu kaŭzis la malkonsenton de Arturo, estis la barilo kiu jam disigis ilin, tamen lia rifuzo restis obstinega fakteto en ŝia koro. La tutan vesperon ŝi nutris sian vunditan fierecon, kaj, kiam fine la noktomezo denove ŝin trovis, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, kun la fantomo de la majoro, ŝia humoro estis en tia stato, kian oni ne volus eĉ nomi necerta, escepte pro deziro ŝirmi la sinjorinon.

La fantomo aperis kiel kutime, riverencante, kaj trinkante glason da kvazaŭvino, kaj antaŭ ol Fraŭlino Gaspi bonvolis montri, ke ŝi rimarkis lian ĉeeston, li jam englutis almenaŭ dekduon da glaso de la trinkajo.

"Kial vi tie staradas trinkante kiel idiotulo?" ŝi demandis pli malafable ol ĝentle. "Unufoje estas sufice ofte por konduti tiamaniere."

"Sed mi ne povos paroli, ĝis oni parolos al mi," respondis la aperajo, sen-kulpigante sin, "kaj mi devas daŭrigi la trinkadon, ĝis oni petos, ke mi faru ion alian."

"Nepre do trinku!" malvarme respondis Ireno, fortunante sin por preni libron. "Mi nur esperas, ke tiom da vino ne malbone efikos sur via cerbo."

"Sed ĝi certe tiel efikos," diris la fantomo per kortuŝanta voĉo; "kaj, dum mia tuta ekzistado, eĉ kiam mi es-

tis nur viro, neniam mi estis venkita de vino, kiam sinjorino ĉeestis."

Parolante ĝi daŭrigis la trinkadon de la fantoma ruĝa vino, kaj Ireno scivoleme ĝin observis.

"Ebria fantomo," ŝi kvieta diris, "estas vidajo, kiun mortemuloj tiel malofte povas vidi, ke oni estus vera malsagulo ne uzante la privilegion observi la fenomenon."

"Bonvolu ordoni, ke mi foriru, ke mi eksidu, aŭ faru ion ajn," petegis la estinta majoro.

"Do diru al mi, kie kuſas la McHugh diamantaro," ŝi respondis.

Sajno de persista obstineco sin montris sur la fantoma vizaĝo, tra kiu ŝi povis malplaze vidi la bronzajn tirilojn de alta komodo apud la kontraŭa muro. Kelkajn minutojn silente la paro reciproke sin rigardegis, kvankam la fantomo daŭrigis la trinkadon. Ireno observis la aperojn kun senkompara mieno, kaj fine eltrovis la interesan fakton, ke ĝi staras sur la piedpintoj. Por unu momento, ŝi vidis, ke ĝi efektive leviĝas, kaj ke la piedoj iafoge tute forlasas la tapison. Unue ŝi timis, ke ĝi baldaŭ evitos ŝin kaj forflugos, sed rigardante pli atente, ŝi konstatis, ke ĝi penas kontraŭstari la inklinon leviĝi en la aeron. Per pli zorga esplorado ŝi eltrovis ke, kvankam la aperajo ankoraŭ levas la neelcerpeblan vinglason per la dekstra mano, per la maldekstra ĝi tenas sin al la dorsapogilo de seĝo, evidente penegante resti malsupre.

"Vi ŝajnas stari sur la piedfingroj," ŝi diris. "Cu vi ion serĉas?"

"Ne," respondis la fantomo konfuzite; "tio nur estas la leviĝado, kiu ne pre rezultas el ĉi tiu konstanta trinkado."

Ireno malestime ridis. "Cu vi volas diri," ŝi senkompare demandis, "ke la signo de fantoma ebrieo estas tendenco altiĝi?"

"En nia rondo oni opinias, ke estas pli ĝentile uzi la terminon uzatan de la okultistoj," iom kolere respondis la aperajo. "Ni nomas ĝin 'leviĝado'."

"Sed mi ne estas ano de via rondo," Ireno gaje respondis, "kaj mi ne havas kunsenton kun la okultistoj. Ĉu ne ŝajnas al vi sage," ŝi daŭrigis, "kon sideri la faktot ke, en la estanta pro gresa tempaĝo, vi ne okupas la saman lokon en popola, nek eĉ en sciencia estimo, kiu antaŭe estis la via? Vi nun estas nura halucinacio, oni scias; kaj ne ekzistas tialo, kial mi ne povas malestimi vin, kiel nuran simptomon de maldigestado aŭ intelekta laceco."

"Tamen vi mem povas vidi, ke mi ne estas halucinacio, ĉu ne?" tremkrietas la kompatinda fantomo, evidentemente fariĝanta tre senkuraĝa.

"Ho, tio nur estas trompo de la sentoj," Ireno respondis, kun malatenta maniero, kiun si sentis malinde kruela, eĉ antau ol si ĉesis paroli. "Tu kuracisto tion dirus al mi, kaj li skribus recepton, por ke mi ne vidu vin refoje."

"Sed li ne povus," diris la aperajo, kun kompatinda malforteco.

"Vi ne scias pri la hodiaŭaj kuracistoj," si respondis ridetante. "Sed, tion forlasante, mi volas diri la jenan: ĉu ne ŝajnas al vi, ke tiu ĉi estas bona okazo por pruvi vian realecon, montrante al mi la kašejon de la diamantoj? Mi promesas, ke mi raportos la cirkonstancojn al la Societo por Psika Esplorado; via nomo estos konservata en la societaj raportoj, kaj vi por ĉiam ĝuas gloran famon, kiun la maledemeco de la epoko ne povos detru."

Ce la nuna tempo la fantomo evidentemente atingis tian staton de ebrieco, ke ĝi tre malfacile sukcesis ne levigi al la plafono. Per malespere forta mantendo ĝi aliĝis al la dorso de la seĝo, dum la piedoj senforde svingis sin en la aero, vane penante retuvi la plankon.

"Sed la Societo por Psika Esplorado ne estas akceptita en nia rondo," ĝi insiste diris.

"Tre bone," senpacience kriis Ireno; "faru laŭ via bontrovo! Sed kion oni opinios pri vi, en via rondo, se vi senpotence reflugos tien en via nuna stato? Ĉu la anaro, kies opinion vi tiel alte takisas, nomos respektinda la levigadon en la ĉeesto de sinjorinoj?"

"Ho, nepenseble!" plorkriis la aperajo de la iama majoro, kun subite maledespera teruro en la voĉo, tiel ke eĉ la sango de Fraŭlino Gaspik malvarmiĝis. "Ho, kia hontindajo! Mi faros, kion ajn vi petos."

Ireno ekscitite tuj saltlevigis.

"Cu vi montros al mi—" si komencis; sed la malforte tremanta voĉo de la fantomo ŝin interrompis.

"Vi devos konduki min," ĝi diris. "Donu al mi vian manon. Mi levigos al la plafono, se mi forlasos ĉi tiun segon."

"Via mano—tio estas, mi—mi ne ĝuas tuŝi fantomojn." Ireno respondis. "Jen, ekkaptu ĉi tion."

Si ekprenis perlamatan papertranĉilon kaj prezentis ĝin al la figuro. La fantomo ĝin ekkaptis, kaj tiamaniere

estis kondukata laŭlonge de la ĉambro, flirtante en la aero simile al birdo. Ireno surpriziĝis pro la forteco, per kiu ĝi tiris la papertranĉilon, sed si rememoris, ke ĝi vere jam englutis grandegan kvanton de sia kvazaŭa stimulilo. Si sekvis la gestojn de la flirtanta mano, kiu tenis la vinglason, kaj tiel ili venis en angulon de la ĉambro, kie la fantomo signofaris, ke ĝi deziras alproksimiĝi al la planko. Ireno malsupren tiris la figuron, ĝis ki am ĝi ekkaŭris en la angulo. Ĝi metis unu diafanan manon sur iun panelon en la muro.

"Serĉu tie," ĝi diris.

Ekscitite Ireno liberigis la papertranĉilon kaj tuj la fantomo leviĝis, kvazaŭ malligita balono, dum la tranĉilo falis tra la senkorpa aperajo ĝis la planko.

"Adiaŭ!" kriis Ireno. "Mi tre dankas vin."

Kaj simile al malklara, nebuleca nubo, super ŝia kapo, la ebria fantomo grade malaperis.

VI

Ireno estis tiel ĝoje fiera, ĉar ŝi venkis la obstinan fantomon de la majoro, ke ne estas supozeble, ke ŝi povis teni sekrete sian eltrovon ĝis la taglumo. Jam estis preskaŭ la unua horo matene, sed irante al la fenestro, kaj transrigardante al la flankajo de la domo, kie la apartamento de la leŭtenonto estis lokita, ŝi ekvidis, ke lia lumo ankoraŭ estas videbla. Kun kaŝita sento, ke li kredeble estas pripensanta la okazintajojn de la tago, Ireno rapidiris tra la koridoro al la ĉambro de Franjo, kiun ŝi vekis kaj sendis por alvoki Arturon.

Franjo, kun karakterize virina maniero, sin jetis en la ĉambron de sia frato ekkriante: "Ho, Arturo, Ireno jam trovis la McHughan diamanton!"

Si estis tiom agitita, ke ŝi ne povis respondi al liaj demandoj; tial restis al li nenio farebla, krom tuja vizito al la loko kie Ireno ilin atendis. Tie Franjo forlasis la junan paron, kaj ekscitite kuris antaŭen al la fantoma ĉambro, lasante ilin sekvi. Dum ili kune trairis la koridoron, la leŭtenonto, kiu eble sentis, ke ne estus saĝe komenci diskuton, kiu eble povos tro klare rememorigi al Ireno la humiligojn de la rivera ekskurso, subite ĉirkaŭprenis ŝin, kaj premis ŝin en siaj brakoj.

"Nun mi povas peti, ke vi edziniĝu

kun mi," li diris, "kaj mi tutkore amegas vin, Ireno."

Sia unua movo estis instinkta baraketo por sin liberigi; sed la konvinkeco de lia premado estis tiel dolca, ke si ne povis kontraustari gin, kaj si nur proteste diris: "Via amo sajnas tre multe dependi de tiuj malamindaj diamantaçoj!"

"Kompreneble," li respondis. "Sen ili mi estas tiel malriĉa, ke mi ne havas rajton pensi pri vi."

"Ho," si kriis kun subita timego, "supozu ke ili ne estas tie!"

Surprizite, la junu viro malfortigis sian premegon. "Ne tie?" li ripetis. "Franjo dris, ke vi ilin trovis."

"Ankoraŭ ne; sed la fantomo—"

"La fantomo!" li ehis, kun malkontenta kaj ĉagrenita tono. "Cu tio estas ciò?"

Ireno sentis, ke sia ora amsongo tutte pereis. Si sciis, ke la leutenanto eĉ ne kredis, ke la fantomo de la majoro ekzistas; kaj kvankam si tiel longatempe kunparolis kun la aperajo tiun nokton mem, sia amanto tiel forte influis sian animon, ke si nun komencis dubi pri la realeco de la fantomo.

Kun pala vizaĝo kaj peza koro si kondukis ilin en sian ĉambron, kaj al la angulo kie la papertranĉilo ankoraŭ kuſis sur la planko, kiel pruvo pri la efektiveco de sia aventuro kun la fantomo. Sub sia direktado la panelo estis malfacile forigata for de la muro. Arturo mokis la tutan aferon, sed li estis sufice bonkora por fari tion, kion la fraŭlinoj petis.

Nur la multjara polvo rekompencis ilin pro la serĉado. Kiam ili certe konstatis, ke tie estis neniaj juvelujoj, la kompatinda Ireno tute perdis sian sinregadon, kaj konvulsie si ekploregeis.

"Ne ploru," Arturo ameme diris. "Ne tiel malĝojegu. Ni ĝis nun ekzistas sen la diamantoj, kaj ni ankoraŭ povos ekzisti."

"Ne estas la diamantoj, por kiuj mi ploras," kriis Ireno, tiel naive kiel infano, kiu perdis favoratan ludilon. "Estas vi!"

Neniu povus kontraŭstari tian petagon. Arturo prenis ŝin en siajn brakojn kaj ŝin konsolis, dum Franjo diskrete ekrigardis aliloken. Oni do permesis, ke la fianĉigo daŭru, kvankam la McHugh diamantaro ankoraŭ ne estis trovita.

VII

Tamen la morgaŭan nokton Ireno renkontis la fantomon kun mieno de

tia malestimo, kia povus malkuraĝigi la spiriton de la patro de Hamleto.

"Vi do opinias, ke decas trompi sinjorinon, ĉu vere?" si severe demandis. "Cu tiamaniere kondutis la sinjoroj de la antikva modo, pri kiuj oni tiom aŭdas?"

"Nu, vi devus memori," sanceligante respondis la aperajo, "ke vi ebriigis min." Verdire, la kompatinda figuro ankoraŭ elmontris la efekton de sia drinkado.

"Vi certe ne estis tre funde ebria," respondis Ireno, "se vi estus tia, vi ne povus min trompi."

"Tamen vi devas kompreni," ĝi respondis, "ke mi nur trinkis la fantomon de vino; tial mi nur fantome ebriigis!"

"Sed, ĉar vi mem estas nur fantomo," estis sia responde, "tia trinkajo devus esti sufici por plene ebriigi vin."

"Mi neniam argumentas kun sinjorino," majeste diris la aperajo, kiu evidente ne povis daŭrigi tiel profundan diskutadon. "Mi almenaŭ sukcesis kiel eble plej multe vin erarigi."

Dirante tion, ĝi iomete turnis la okulon al la ĉambrangulo en diagonala direkto de la loko, kie ĝi malaperis la hieraŭan nokton.

"Ha!" kriis Ireno, kun subita kompreno.

Si saltleviĝis, kaj komencis movi antikvan komodon for de la angulo kie ĝi staris. Gi estis pezega, sed si ne petis helpon. Si penegis kaj laboregis dum la fantomo klare evidentigis sian embarasigon, ĝis si sukcesis forpuvi la komodon; tiam si eksidis sur la planko, kun la lampo apud si, kaj komencis esplori la muron.

"Forvenu, mi petas," malĝojege diris la fantomo. "Malplaĉegas al mi, vidi vin tie sur la planko. Venu kaj eksidu apud la fajro."

"Mi dankas vin," si respondis. "Mi estas tre kontenta ĉi tie."

Si palpis la panelojn; si premetis kaj puſetis ilin; unu horon kaj plie si laboris, penante ilin penetri, kaj super si staris la fantomo petegante, ke si foriru. Si jus decidis ĉesigi la penadon, kiam ŝiaj fingroj, tien kaj reen frotante la tabuleojn, eligis polveron el trueto en la rando de iu panelo. Tuj si eltiris harpinglon el siaj haroj, kaj ensovis la pinton en la etan enirejon. La panelo ekmoviĝis, malrapide sin turnis sur kaſita ĉarniro, kaj tiom malfemiĝis, ke si povis enmeti la fingrojn kaj gin repusi. Videbligis speco de ĉambreto, kaj en ĉi tiu kuſis aro da skatoletoj, polvokovritaj, kaj truigitaj

de tineoj. Si ekkaptis la plej proksiman skatoleton kaj ĝin malfermis. Jen, sur sia kušejo el senkoloriginta veluro, brilegis la "McHugh stelo", mirinde belega kaj plej altvalora.

"Ho, miaj diamantoj!" kriis la fantomo de la majoro. "Ho, kion diros mia rondo?"

"Ili havos la rajton diri, ke vi estis malgentila al sinjorino," respondis Irene kun nenececa severeco. "Vi preferasis la okazon fariĝi fama, kiel bonfaranto al via familio."

"Nun mi estas nura drinkema fantomo!" plorĝemis la aperajo, kaj ĝi malvidebligis en la aero.

Tiamaniere okazis, ke la "McHugh stelo" ornamis Irenon ĉe la edziniĝa soleno; tamen, la obstineco de la homaro estas tiel granda, ke si ne nur estas konvinkita de sia edzo, ke la fantomoj ne ekzistas sed si estas tute perdinta la povon ilin vidi, kvankam si ricevis tiun eksterordinaran kaj grandvaloran povon, kiel heredajon de sia praoenklino, kiel estas jam dirite.

THE MOST INTERESTING OF RECENT COMMUNICATIONS

....., Minn., 1916

Sinjoroj:— Because being old and crippled, and an inmate in a home of Helpless, therefore, unable to earn any more dollars, consequently a useless individual, I considered and reconsidereed if I should continue as a subscriber to Amerika Esperantisto, but because I yet have a dollar to spare, and remembering that I have stood a subscriber to Amerika Esperantisto, since its birth at Oklahoma City, I concluded to remain in the ranks of the vanguards of civilization.

I can read Esperanto as fluently as my mother language, but I can not write it grammatically, as the inclosed translation "La Infana Mondo" will testify.

Tre vere via,—G. K. Carlsen.
(Two weeks later)

..... Minn., 1916.

Sinjoroj:— Like "Boncjo Svajg" when he was ushered into Paradise, afraid it was but a dream, so I, by reading your laudatory remarks about my excellent Esperanto, could not but doubt my senses. However my 70-year's-old face actually blushed with a modest "Thank you!" But let earnestness take the place of humor.

When Amerika Esperantisto was pushed into publicity in 1906, I, amongst the many thousands who, presumably, read about its birth and baptism in Okla. City, sent for the first issue, out of curiosity. After studying its contents for a few days, I became inspired by a new, strange thought-wave, and since those never-to-be-forgotten days I have loved and almost adored the language Esperanto without knowing why.

With no other instructor than Arthur Baker's Amerika Esperantisto,

and his American Esperanto Book I commenced to read the words in Esperanto aloud, without at first understanding what I read about, but taking care at giving the vowel-sounds, and the next to the last syllable a good kick of accentuation.

By this method I found my reading went with a peculiar waltz-time, "a la Immortelles", and during the day-by-day reading aloud, my ears also became accustomed to the sound and the understanding followed close in those steps. When a person past 60 years with but a little common school education can learn to read and write Esperanto in a few weeks' time, then boys and girls with high-school and academic education should be able to read and write it in a few days.

Linguists and persons with higher education are probably able to read it, understandingly at once.

Feeling I am in touch with the humanitarian mind of Esperantism, I am determined to follow, spiritually, in this Grand March, "Tra la Mondo," and because I feel also that an Esperantujo is not a "fata morganic" phenomenon, and that the language Esperanto is not only a "language of beauty," but shall be "a joy forever."

Sincerely yours,—G. K. Carlsen.

LA INFANA MONDO

Patrino klarigas al sia malgranda filo, ke mensoguloj ne atingas ĉielon.

Filo—Panjo, ĉu vi neniam mensogis?

Patrino—Nu, mia fileto, mi ne scias, eble iufoje dum mia vivo, mi rakontis ion nevera.

Filo—Ĉu paĉjo iam mensogis?

Patrino—Mi timas ke li estas kulpa pri tio.

Filo—Cu Onklino Fanjo iam mensongis?

Patrino—Knabo mia, neni, mi timas, je iu aŭ alia tempo de la vivo, estas senkulpa.

La knabo, pripensinte dum momento, diris: "Panjo, estus terura soleco en la ĉielo kun nur Dio kaj Georgo Washington."

Novalveninta Pastro—Cu via patro timas la Sinjoron, Dio?

Knabo—Jes, sinjoro, mi tion divenas, ĉar li portas sian pafilon kiam ajn li eliras dimanĉe.

Lernejestro, dimanĉe—Tomaso, mi estas tre surprizita, aŭskultante vian blasfeman lingvon kiam mi eniris.

Tomaso—Mi ne povis ĝin malhelpi, sinjoro. Tiu fremda knabo nomis mi an religian kredon, sensencajo.

Flossie—Mi timas dormi sola en tiu mallumeco.

Patrino—Vi iru rekte liton, kiel bona knabineto, kaj memoru ke la malgrandaj anĝeloj de Dio ĉeestas.

Flossie (post dek minutoj)—Mi ne povas dormi, Panjo, unu el la malgrandaj anĝeloj de Dio, mordas min.

"Patro," diris la knabo, "Salomono posedis dek cent edzinojn, ĉu ne?"

Patro—"La Biblio tion diras."

"Nu, Patro, ĉu li estis la viro kiu diris:—Donu al mi liberecon aŭ morton!" —Trad. G. K. Carlsen.

KIAM GOETHE KONSULTIS ORAKLON

Junulo dudektri-jara, Goethe faris piediron tra la bela valo de l'rivero Lahn. Liaj okuloj, edukitaj por eltrovi la pentrindajn belecojn de la Natura, plezuregis, meditante super la veproriĉaj rokoj, la sunaj altajoj, la dolce akvataj valoj, la tronantaj kasteloj, kaj la de malproksime logantaj bluaj montoj, kaj pli forta, ol iam, fariĝis en li la deziro, esti pentristo.

"Mi vagis"—tiel rakontas li en sia "Poezio kaj Vero"—"sur la dekstra bordo de l'rivero, kiu iom profunde kaj malproksime sub mi, kovrita parte per luksaj salik-penikoj, glitadis en la sunlumo. Tiam ekrevivis en mi la malnova deziro, tiajn objektojn povide imiti. Mi okaze havis belan postranĉilon en la maldekstra mano, kaj nun el la fundo de l'animo sonis kvazaŭ ordone: mi jetu tuj la tranĉilon en la riveron. Se mi vidos ĝin enfali, mia artema deziro plenumiĝos; sed se la enmergiĝo de l'tranĉilo estos kaŝata per la superpendantaj salikbranĉoj, mi forlasu la deziron kaj klopo-dojn. Apenaŭ tiu kaprico venis al mi en la kapon, ĝi estis obeata. Car, ne genante min pri la utileco de la tranĉilo, kiu kunigis en si kelkajn diversajn instrumentojn, mi jetegis ĝin per la maldekstra mano, kiel mi ĝin tenis, en la riveron. Sed ankoraŭ nun mi devis sperti de la oraklo la trompan dusencecon, pri kiu oni tiel maldolce plendis en la pratempo. La eniĝo de l'tranĉilo en la riveron estis kaŝata al mi per la salik-branĉoj, sed la akvo, reaganta al sia dismeto, saltis kvazaŭ forta fontano supren kaj estis al mi perfekte videbla. Tiun fenomenon mi ne prijuĝis favore por mi, kaj la dubo

tial vekita en mi estis poste la kaŭzo, pro kiu mi ekzercadis min pli intermite kaj senzorge kaj per tio faris mem okazon, ke la diro de l'oraklo estu plenumata."

El la germana lingvo,
Trad. Herbert M. Scott.

LA VOKO

De Hu I. Keyes

"Tra la mondo iras forta voko."—Zamenhof.

Ho partoprenantoj en Nia Afero

Sur kia ajn loko!

Al vi la alvoko:

Konservu la vivon de l'sankta fajrero;
Vigligu la flamon, ĝis tutla tero
Heliĝos per lumo de ĝia espero!

Ho samideanoj el kiu ajn gento!

Momenton silentu—

Aŭskulte atentu!

Cu ne al vi venas sub sono de l'vento
Plendegoj pri homa malinterkonsento?
Sapiroj al interpopola kontento?

Kolegoj! kun forta teniĝo racia

Antaŭen rigardu—

Por penoj vin hardu!

Ne lasu la taskon al iu alia;

Ja ĉies por ĉiam la frukto premia—
Sed estu la glora plantado la nia!

Ho Esperantistoj! heroa la rolo

Por vi difinita—

Al vi rezervita:

Per fortaj kaj faroj de manoj kaj volo
Senlace vastigi je colo post colo
La dolcan regadon de l' Verda Simbo!

PREPAREDNESS!!!

Loaded with a MAY PROPAGANDA NUMBER, you have the sceptic at your mercy.

FAMILIARITY APPRECIATION COMPREHENSION TRUTH

SOLID KNOWLEDGE

concerning the Esperanto Movement will comprise the contents of this issue. Articles relating to every phase of the work.

READ—and strengthen your own faith!

DISTRIBUTE—and convince others!

SPECIAL PRICES ON ADVANCE ORDERS:
FIVE copies—25 cts. TEN for 50 cts. TWENTY-FIVE for \$1.00

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

West Newton, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd.
Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Pk. Bvd.
New York, N. Y., sercas angle kaj esperante rakontojn de diversspecaj abnormalaj psikaj spertoj.

S-ro G. B. Cognali, Udine, Italy, I.P.K., Esp. kaj Itale. 4

S-ro V. N. Kossizin, Cigirinskaja 3, Blagovescensk, Na. Amur, Siberia-Russia. 4

S-ro A. F. Sundermeyer, 408 Scanlan Domo, Houston, Texas, Usono. 4

S-ro N. V. Nekrasov, la Tverskaja, Jamskaja, 35, Moskvo (Russia), L., I. P. K., P. M., gazetojn. Ciam respondos. 4

S-ro V. Dobrovolskij, Dmitrjevskaja, 8, Bobrujsk, Minsk, gub. (Russia), IPK., L. Ciam respondos. 4

S-ro T. P. Skurin, Upravlenie Voinskago Načalinka, Brjansk, Orlov gub. (Russia). 4

S-ro Kenneth Woodward, 24 Lenox St., Uniontown, Pa. 4

S-ro Charles F. Davis, Fort Collins, Colo. 4 Spain

S-ro Nicasio Terrasa, str. Union, 53 ent. Palma de Mallorca.

S-ro Jaime Brossa, str. Lazareto 23, Barcelona.

Čiuj Amerikaj nomoj kiuj aperas sub ĉi tiu rubriko aperas ankaŭ senpage en "Kataluna Esperantisto" (Barcelona, Hispanujo), per speciale aranĝado kun tiu administracio. Tiamaniere ni donas al niaj amikoj bonegan metodon por akiri plenan liston da korespondantoj, preskaŭ senpage.

F-ino Manuela Gallardo y Gomez, Villa-neuva del Arzobispo, Jaen.

ESPERANTISTOJ

Uzu la belajn markojn en via propagando. Ili enhavas la frazon "Lernu la lingvon internacian Esperanto." Oni eldonis ilin en ĉiuj la lingvoj el Eŭropo kaj plej gravaj el Azio kaj Afriko.

100 markoj en sama lingvo, kontraŭ 4 respondkuponoj; 50 markoj en 50 diversaj lingvoj kontraŭ 2 respondkuponoj. Konto ĉe la Ĉekbanko. S-ro Joan Amades, Peu de la Creu 10, Barcelona (Spain).

MONOCRAM EMBOSSE

Handy, compact, distinctive neat everlasting. An ideal gift at any time. One or two letters, 25 cts. Leahy's, Bx. 264, Alexandria, Va.

MIGRANTAJ KARTOJ ! ! !

6 FOR 10 cts. 25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER

332 Third Ave., Dayton, Ky.

FOR 60 c.

(Sm. 1,250) we will send to you,

1 CONGRESS BADGE	\$.35
20 EXPOSITION POSTALS IN ESPERANTO	.15
20 CALIFORNIA POSTALS IN ESPERANTO	.15
1 48 PAGE ESPERANTO GUIDE BOOK OF SAN FRANCISCO AND VICINITY	.05
The above prices are 30% below actual cost	

THE KALIFORNIA ESPERANTISTA RONDARO

946 Central Ave.,
SAN FRANCISCO, CALIF.
Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista

THE WRITER'S MONTHLY

A Monthly Magazine of Interest to Literary Folks

\$1.00 Yearly

THE WRITER'S MONTHLY
SPRINGFIELD, MASS.

LA “ACCOMPANO”

Nova Elpensajo kiu ebligas ke vi ludu

TIAN MUZIKON KIAN VI GUAS

Nova kontrolmetodo kiu estas enestanta parto de ĉiu

“EMERSON” ELEKTRA LUDIGILO

Oni povas reguli kaj frazigi la muzikon el distanco.

Kiel montrate per la bildo, la kantistino ludas sian propran akompanajon. Per nur iomete da sperto, oni povas ludi la akompanajon tiamaniere, multe pli bone ol per la manludado.

Aŭ, vi povas ripoze sidi, kaj sen konscia penado viviĝas viaj muzikaj elpensajoj.



Vendistoj en Ĉefaj Urboj kaj Urbetoj
Petu katalogon

EMERSON PIANO CO., Boston, Mass.

Fondita 1849